

UNIVERSITATO DE SANTIAGO DE COMPOSTELA (USC)
kaj HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO (HEF) (Asocio de Publika Utilo, 1993)

UNIVERSIDAD DE SANTIAGO DE COMPOSTELA (USC)
y FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO (HEF) (Asociación de Utilidad Pública, 1993)

**INTERNACIAJ PREUNIVERSITATAJ SOMERKURSOJ
PER ESPERANTO (K+E)
CURSOS DE VERANO PREUNIVERSITARIOS INTERNACIONALES
EN ESPERANTO (K+E)**



Poŝta adreso / Dirección postal: Cursos Internacionales en Esperanto.- Facultad de Ciencias Políticas.- ES-15706 Santiago de Compostela (España / Hispanio).

Teléfono kaj telefakso / Teléfono y telefax: +(9)81'59'80'05

Retpoŝto / Correo electrónico: iiespnto@usc.es

Bankkonto / Cuenta bancaria: Caixa Galicia, Santiago de Compostela, c/c 2091 0388 9831 1000 0977

Informilo / Boletín informativo n-ro 3.- 06.05.97.

Eldonita en Esperanto kaj en la hispana lingvo, en apartaj eldonoj / Editado en Esperanto y en español, en ediciones separadas.

Adresitoj.- Tiu ĉi cirkulero estas dissendita al:

- La 91 Landaj Esperanto-Asocioj registritaj en la Jarlibro 1996 de Universala Esperanto-Asocio, kun peto kaj antaŭdanko pri trastudo kaj informo al siaj anoj pere de siaj organoj, ankaŭ ke ili tuj transsendu la cirkuleron al la respektivaj sekcioj de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, kaj **ke ili laŭeble helpu la okazigon de tiuj ĉi Kursoj laŭ la maniero indikota en punkto (15).**

Pro kaŭzoj vidotaj en tiu (15), **ni nin turnas tute speciale al la Landaj Asocioj en kies teritorio troviĝas la dek Eŭropaj Kulturĉefurboj por la jaro 2000a.**

- Diversaj edukaj kaj sciencaj institucioj kaj elstaraj personoj registritaj en la dirita Jarlibro, kiel ankaŭ ĝeneralaj periodaĵoj en Esperanto, kaj ĝeneralaj radiostacioj kun programoj en Esperanto, kun peto kaj antaŭdanko al ĉiuj, ke ili bonvolu dissendi informojn pri K+E al siaj membroj, legantoj, aŭdantoj.

- Diversaj klerigaj kaj politikaj instancoj hispanaj kaj internaciaj.

(A) ĜENERALA INFORMARO

(1) La Universitato de Santiago de Compostela kaj Hispana Esperanto-Federacio invitas studentojn el ĉiuj landoj al la unua eldono de siaj Internaciaj Preuniversitataj Somerkursoj per Esperanto, laŭ jena detalo:

(a) La lecionoj, laŭ nivelo preuniversitata, okazos en la dirita USC, en datoj de 16a al 25a de la venonta julio 1997 (inklude de ambaŭ tagoj), kaj estos farataj tute kaj nur en Esperanto.

Se tiu ĉi eldono montriĝos sukcesa, la estontaj eldonoj estos pli riĉaj je enhavo, kaj kun kalendaro pli ampleksa.

(b) La kursotemoj estos ĉijare la tri jenaj:

- Studo pri la hispana poeto Federico García Lorca, kaj pri uzado de la hispana asonanco en la poetiko de Esperanto.

- Enkonduko en la eŭropan juron.

- Elementa astronomio.

(Detalojn pri profesoroj kaj pri verkoj uzotaj vidu en (13)).

(c) La diritaj datoj estis fiksataj por ilin ligi al la tagoj 8a ĝis 13a de julio en kiuj, organizite de HEF, okazos en la urbo Valencia (Hispanio), jenaj tri eventoj: La 7a Internacia Esperanto-Kongreso, la 7a Eŭropa Esperanto-Forumo kaj la 56a Hispana Esperanto-Kongreso. (La Universala Esperanto-Kongreso okazos ĉi jare en Adelajdo (Aŭstralio), en tagoj 19a-26a de julio).

La tasko verki, instrui kaj lerni en tiu ĉi projekto K+E estas disvolvata de Esperanto-uzantoj. Siaflanke, USC akceptis la peton de HEF, provizi institucion infrastrukturon kaj komencan apogon al K+E, ja kun celo ke ĉiuj personoj kaj institucioj interesiĝantaj pri klerigado, pri lingvoinstruado kaj pri lingvaj problemoj en la internacia komunikado -inter ili, USC mem- povu objekte observi la funkciadon kaj rezultojn de tia kompleta plurlara eksperimento internacia, kaj tiele disponi bazon por propra posta eventuala konkreta decido rilata al K+E.

Espero de K+E estas, ke ĝia evoluo kaj progreso estos tiaj, ke ĝi fine meritos la oficialan agnoskon kaj la financon apogon de ĉiuj institucioj internaciaj kaj naciaj sin okupantaj pri la aferoj kaj problemoj cititaj en la ĵusa alineo. (Por ekzemplo, laŭ unu el la aneksaĵoj al la tria el la tri favoraj rezolucioj pri Esperanto jam aprobitaj ĝis nun de UNESKO (en 1954, 1985 y 1993), io estus farebla pri tiu ĉi interlingvo kadre de la projekto LINGUAPAX (1988-1997), ja tamen sub la nepra procedura normo de UNESKO, ke temu pri afero iniciatita de iu(j) Ŝtato(j)-Membro(j)). Nu, supozeble tio sama validos por la programoj postvenontaj de LINGUAPAX).

(2) K+E principe celas gelemantojn en aĝo kaj grado de abiturientoj tuj komencontaj siajn universitatajn studojn, kvankam ja povas temi pri personoj jen iom super la dirita nivelo, jen iom sub ĝi.

Oni antaŭvidas ankaŭ la eblecon, ke al la Kursoj aliĝu malgranda nombro da pli aĝaj personoj, mem libervolaj observantoj kaj/aŭ akompanantoj al la studentoj.

Krom tio, oni invitos diversajn instituciojn -tiel ĝeneralajn kiel de Esperanto-uzantoj-, ke ili bonvolu sendi observantojn-informantojn.

(3) La tuta kotizo por ĉiu persono en tiu ĉi unua (K+E)-eldono estas la jena, en hispanaj pesetoj:	
(a) Kostoj administraj.....	5.000
(b) Loĝado en studenta hejmo universitata, en komfortaj dultitaj ĉambroj kun banujo en ĉiu el ili, ĉambroj apartaj por knaboj aŭ knabinoj, po 2.000 pesetoj ĉiutage, 10 noktoj, 2.000x10.....	20.000
(c) Manĝado en restoracio de la studenta hejmo, po tri manĝoj ĉiutage, po 1.500 pesetoj ĉiutage, 10 tagoj, 1.500x10.....	15.000
(d) Studmaterialo (3 libroj kaj 1 kasedo).....	5.000
(e) San-asekuro.....	2.000
(f) Komplementaj kulturajoj (ekskurso k.a.).....	5.000
Entute (kvindek du mil pesetoj).....	52.000

Loĝado, manĝado kaj instruado okazos en najbaraj ejoj, do sen transportproblemoj. La ĉiĉeronado, egale kiel la instruado, okazos en Esperanto.

(4) Por sin registri, ĉiu unuopa persono devas sendi jenon al la poŝta adreso indikita kape de tiu ĉi cirkulero:

(a) Bankoĉekon, aŭ fotokopion de banka transpagilo aŭ de poŝta mandato, por 52.000-peseta sumo, favore al "Cursos Internacionales en Esperanto" ktp, kiel kape indikite.

(b) Simplan folion dirantan:

Mendas aliĝon al (K+E)-eldono de 1997: Nomo(j) persona(j) kaj familia(j). Sekso. Aĝo. Studnivelo atingita. Nacieco. Kompleta adreso (strato, numero, etaĝo, poŝta kodo, urbo, lando). Telefono / fakso / ret-poŝto. Persono en la koncerna lando, kontaktenda ĉe eventuala bezono (nomo, adreso, telefono, ktp). La aliĝon petas estiel studento aŭ estiel libervola observanto (nepre nur unu el tiuj du alternativoj). Asertas ke posedas bonan kapablon pri Esperanto. Deziras loĝi en la sama ĉambro kiel... (se ekzistas tia prefero, indiku nomon de la alia aliĝinto). Numero de la banka ĉeko aŭ de la banka aŭ poŝta transpago por pago de la tuta kotizo, kaj nomo de la liverinta oficejo.

(Krome, se la mendanto jam scias pri sia alveno [dato, horo, flughaveno / trajnostacio / busostacio], estos utile, ke li/ŝi tion indiku sur tiu folio; se ankoraŭ ne scias, do bonvolu poste informi la organizantojn en tempo oportuna por ricevi adekvatan helpon kaj gvidon ĉe alveno, kiel dirote en (8)).

Por la kazo, ke oni deziras pli longan restadon (do ekde antaŭ la 16a kaj/aŭ ĝis post la 25a), oni tion indiku sur la aliĝilo, kaj la organizantoj faros sian eblon por helpi tiurilate, kaj laŭe tuj informos la mendinton.

(5) Mendo sen samtempa pago kiel dirote en (4) ne estos akceptita; krome, la organizantoj ne havos devon korespondi pri tia nekompleta mendo, kvankam ili klopodos agi kiel eble plej bone por ĉiuj.

Tuj ĉe ricevo de la mendo kun pago oni tion konfirmos al la sendinto per la vojo plej rapida el tiuj indikitaj de li/ŝi sur la enskribfolio laŭ (4).

(6) La minimuma dezirata nombro da gestudentoj por tiu ĉi unua eldono estas 10 (dek), kaj la maksimuma allasebla nombro estas 25 (dudek kvin).

Se tiu minimumo ne estos atingita, la organizantoj rajtos decidi, ĉu la Kursoj okazu aŭ ne. Se la nombro da petantoj superos la diritan maksimumon, oni akceptos la plej frue venintajn.

Pri ĉia eventualo la organizantoj informos kiel dirote en la sekva punkto.

(7) Aliĝo kiel eble plej frua estas petata kaj antaŭdankata. La limdato por aliĝo estas la mateno de la 1a (unua) de julio.

En la posttagmezo de tiu tago (aŭ pli frue se la maksimuma nombro estos pli frue atingita), eliros dua mesaĝo al ĉiu mendinto, nun kun informo pri tio, ĉu la Kursoj fakte okazos, aŭ ĉu oni nuligis ilin, aŭ ĉu, bedaŭrante, oni ne povas akcepti la koncernan personon pro jama atingo de la dirita maksimumo.

Ankaŭ tiu nova informo iros per la vojo plej rapida el tiuj kiuj estos indikitaj sur la respektiva enskribilo.

Okaze de kursonuligo aŭ de neeblo akcepti personon, la tuta kotizo estos repagita.

(8) La oficiala akcepto de la studentoj, disdonado de dokumentoj k.s. okazos en la mateno de 16a julio. Jam ĉe alveno al la flughaveno, stacidomo aŭ busostacio, ili estos helpataj kaj gvidataj de deĵoranto Esperanto-parolanta kaj identigebla sub afiŝo kun (K+E)-logotipo.

(9) La profesoroj kaj la studentoj de la Kursoj ricevos dulingvan diplomon, kune subskribitan de USC kaj de HEF.


(10) La horaro en ordinaraj tagoj estos la jena (hispana somertempo = UTC+2):

Antaŭ 9:30, matenmanĝo.- 9:30/10:30, leciono.- 10:30/11:00, ripoztempo.- 11:00/12:00, leciono.- 12:00/12:30, ripoztempo.- 12:30/13:30, leciono.- 13:30/16:00, tagmanĝo, ripozo kaj libera tempo.- 16:00/18:00 (kune ĉiuj profesoroj kaj studentoj), ronda tablo, demandoj kaj respondoj, debato pri la tiutagaj lecionoj.- Ekde 18:00, komplementaj aranĝoj, vespermanĝo, libera tempo.

En la alventago okazos disdonado de dokumentoj, interkona sesio, definitivaj informoj pri lecion-ordo, unua ronda tablo. Pri la horaro en festotagoj oni informos per la aviztabulo.

(11) La programo pri komplementaj aranĝoj ne estas ankoraŭ fiksita, sed ni antaŭvidas plurajn eblaĵojn: Gvidataj vizitoj al la urbo, ekskurso al montaro aŭ maro aŭ aliaj urboj, filmo parolata en Esperanto, balo kun diskomuziko de Esperanto-ensembloj, folkloro festo honore al K+E.

Krome, ni esperas, ke ĉio ĉi kombiniĝos kun la analogaj aranĝoj de la kutimaj somerkursoj pri la galega kaj pri la hispana lingvoj ĉiujare organizataj de USC por internacia studentaro.



(12) Ni sincere dankos ĉian eventualan skriban bondeziron kaj/aŭ interesiĝon pri K+E fare de personoj kaj institucioj (kiuj, kompreneble, ju pli altrangaj, des pli bonaŭguraj al la estonteco de la Kursoj).

(B) DETALO PRI STUDOTEMOJ

(13) En tiu ĉi unua (K+E)-eldono estos prezentataj jenaj tri temoj (sekvendaj de ĉiuj studentoj):

(a) La eseo "Sur la spuroj de Federico García Lorca", far Inĝ. Miguel Fernández Martín (Madrid, Hispanio), tradukinto en Esperanton de la Lorca-teatraĵoj "La domo de Bernarda Alba" kaj "Sanga Nupto". La libron pliriĉigas ampleksa albumo pri Lorca (kun entute 40 fotoj, desegnaĵoj, muziknotoj), kiun ni ŝuldas al la valora helpo de Fondajo Federico García Lorca (Madrid, Hispanio).

La libron akompanas sonkasedo en kiu la aŭtoro (mem bona kantisto) legas selektitajn fragmentojn de sia eseo, deklamas la poemojn kaj kantas la andaluzajn koplojn kaj popolkantajn entenatajn en la eseo (kion li ja faras ankaŭ en la klasĉambro).

Dua parto de tiu ĉi temo estas studo pri uzado de la hispana asonanco en la poetiko de Esperanto, sin helpante por tio per la fama traduko kiun Fernando de Diego faris de la "Cigana Romancaro" de Lorca.

En la posttagmezaj rondaj tabloj la studentoj deklamas tiujn poemojn, kaj kantos (aŭ almenaŭ klopodos kanti!) tiujn koplojn -ja vere belajn, sed ja tre malfacile kanteblajn.

(b) La traktato "A.B.C. de la Eŭropa Unio. Enkonduko en la Eŭropan Juron", far D-ino María Rafaela Uruetia Álvarez, Prof. pri Internacia Publika Juro kaj Internaciaj Rilatoj en la Universitato de Valladolid (Hispanio). (Por sia verko la aŭtorino ricevis helpon de D-ro André Ruyschaert, juristo-tradukisto en la Eŭropa Tribunalalo de Luksemburgo, kaj de D-ro Brian R. Moon, tradukisto en tiu sama Tribunalalo). La libron ilustras 12 fotoj rilataj al la temo, afable disponigitaj al ni de la Centro por Eŭropa Dokumentaro de la Universitato de Valladolid.

En la koncernaj rondaj tabloj oni pli speciale debatos pri aferoj rilataj al la estonteco de la Unio, kaj inter ili la enkorpiĝo en la Union de la landoj de Orienta Eŭropo, kaj -kompreneble- la internacia lingvoproblemo, tiel specife en Eŭropo, kiel ĝenerale en la tuta mondo.

Al tiu debato pri la lingvoproblemo ni planas inviti studentojn de aliaj internaciaj somerkursoj de USC; krome, ĉiu studento ricevos po unu ekzempleron de la hispanlingva, abunde ilustrita libreto "Pro Esperanto" (= (Plede) por Esperanto), ĵus eldonita de Hispana Esperanto-Federacio.


(c) "Elementa praktika kurso pri astronomio", far doktoriĝanto Lic. David Galadí-Enríquez, Departemento pri Astronomio kaj Meteologio de la Universitato de Barcelona (Hispanio), kun abundo da belaj ilustraĵoj desegnitaj far la libroaŭtoro mem. (Por sia verko la aŭtoro ricevis helpon de Prof. D-ro H.M. Maitzen (Universitato de Vieno) kaj de Prof. D-ro Amri Wandel (Universitato de Jerusalemo)).

Grava parto de tiu Kurso estos manipulado de portebla teleskopo, kaj faktaj astronomiaj observoj pere de ĝi. Krome, oni faros gvidatan viziton al la Astronomia Observatorio de Santiago.

- Pro nesufiĉeco de la financaj rimedoj atingitaj, ni kun granda bedaŭro devis rezigni prezenti ĉi-jare ankaŭ la libron kaj kolekton "Muzik-instrumentoj tra la tempo kaj la mondo", de Prof. Hervé Gonin, lingvoinstruisto de Lambres-lez-Douai (Francio). Tiu mirinda kolekto konsistas el pli ol 350 muzikiloj el pli ol 69 landoj, kaj la libro -abunde ilustrita de la aŭtoro mem- konsistigas ankaŭ sisteman gvidilon-katalogon de la kolekto. La granda antropologia kaj estetika valoro de tiu juvelo kreskas ĉar temas pri viva prezento farata de prof. Gonin, kiu eksplikas la originon geografian kaj kulturen de ĉiu instrumento, ĝian konsistemon kaj familion, kaj aŭdigas la sonon de ili ĉiuj.

Ni fidis ke tiun kolekton kaj libron ni povos prezenti en (K+E)-eldono de 1998, eventuale ĝin prezentante ankaŭ al pli vasta publiko, profitante la fakton ke prof. Gonin povas instrui ankaŭ en la hispana.

- Pro la sama financa kialo ni ankaŭ ne povas ĉi-jare venigi teatro-ensemblon nek muzik-kant-ensemblon el tiuj pluraj ekzistantaj uzantaj Esperanton. Kompreneble, se (K+E) firme enradikiĝos, ja ĉio ĉi fariĝos nepre ero de la Kursoj.



(C) SKEMO PRI K+E.

(14) Ni tre resume ĉerpas el la (K+E)-informiloj n-ro 1 kaj 2:

(a) K+E konsistigas taskon kun strikte kleriga kaj akademia celo, kaj tute sen profita celo.

La gvidado kaj kontrolado de la tuta agado kaj financado estas oficiale farata de USC.

(b) Internacia universitata profesorado verkas librojn pri siaj respektivaj fakoj, specife adaptitajn al la strukturo, celo, daŭro, etoso kaj nivelo de K+E. Laŭ tiu vojo grade estiĝos valora biblioteko de preuniversitata nivelo, kiun USC eldonados.

Jam 17 profesoroj el 8 landoj pli-malpli konkrete akceptis kunlabori en la projekto -kvar el ili eĉ jam plenumis sian kunlaboron. Krom la kvar temoj cititaj en (B), estas anoncigitaj klerigkibernetiko, geometrio, statistiko, komputiko, lingviko, tradukarto, ludo-teorio, relativeco-teorio, senlaboreco kaj inflacio, kemia nomenklaturado, nodoj kaj teksaĵoj, k.a.

(c) Tiuj profesoroj-aŭtoroj estas mem la instruantoj per siaj libroj en la klasĉambro.

(d) Internacia lernantaro sekvas la kursojn en klasĉambro.

(e) La aŭtoroj-profesoroj kaj la lernantoj ricevas koncernajn dulingvajn diplomojn kune subskribitajn de USC kaj HEF, tiel ke estas esperate, ke oni baldaŭ sukcesos pruvi, ke ili meritas internacian kaj nacian oficialan agnoskon pro sia akademia valoro, egale do kiel la diplomoj de tiom da parencaj agadoj, kaj ke tial tiu oficiala agnosko fakiĝos.

(f) Laŭ tiu vojo K+E celas iĝi unu plia ero en la relative riĉa kleriga agado jam delonge ekzistanta per utiligado de la grava homa kaj kultura kapitalo kristaliĝinta ĉirkaŭ kaj pere de Esperanto. Tute speciale, ĝi esperas atingi la nivelon povi esti konsiderata unu el la antaŝtupoj taŭgaj por la plene universitata nivelo de la Akademio Internacia de la Sciencoj -kreita en 1983 de la sanmarina registaro-, kaj kiu provadas Esperanton estiel lingvon neŭtralan, taŭge planitan ankaŭ por sciencaj celoj.

(g) Kiel jam dirite fine de (1), K+E krome celas al situacio, en kiu la laborado ja venu de Esperanto-uzantoj, tamen *nur* la laborado, ĉar la oficiala agnosko kune kun la financaj rimedoj bezonataj grade venadus de la institucioj kaj programoj internaciaj kaj naciaj por interŝanĝado de studentoj kaj de profesoroj, por novigado pedagogia, por lernado de fremdaj lingvoj, por internaciaj kulturfestoj kaj -solenoj, por eldonado de la koncernaj libroj kaj informiloj, ktp.

Grava paŝo en la direkto celata de K+E ŝprucas el la jam anoncita preteco de la urbestro de Santiago de Compostela (kiu estas unu el la dek Eŭropaj Kulturĉefurboj por la solenoj de la jaro 2000a), enprogramigi (K+E)-n en sian kulturalan oferton por tiu jaro, tamen sub la nepra kondiĉo, ke en tempo oportune frua la Universitato USC oficiale informus ilin, ke K+E jam atingis nivelon adekvatan por tia solena eventaro.

Vidu ankaŭ tion diritan pri LINGUAPAX fine de (1).

Iel parenca al ĉio ĉi estas la fakto, ke la hispana registaro atribuis en 1993 al Hispana Esperanto-Federacio la oficialan kvalifikon "Asocio de Publika Utilo".

(h) Laŭ la principo en (14a), kaj almenaŭ tiom longe, kiom K+E ne sukcesos iĝi finance firma kaj memstara, la aŭtoroj-profesoroj verkas kaj instruas nepagata, kaj lasas la proprion de tiuj siaj libroj al K+E.

La disvendado de la verkoj okazos tiel al la partoprenantoj en K+E, kiel al la ĝenerala publiko, kaj la tiel ricevota mono estos reinvestata en eldonado de novaj verkoj. Laŭ tiu vojo, ĉe eventualaj enradikiĝo de K+E kaj bona vendado de la libroj, oni samtempe sukcesus pri la estigo de preuniversitata biblioteko laŭ (14b), kaj pri estigo de kapitaleto estiel unua paŝo al la celata firma memstareco financa de K+E.

(i) Ĝis nun jam okazis jenaj vive dankataj financaj helpoj por la nuna ĝerma stadio de K+E: Por infrastrukturaj aferoj kaj eldonado de informiloj kaj de studmaterialo kontribuis USC, la Urbestro de Santiago de Compostela kaj HEF. Pri venigo de la profesoroj laŭ (14g), tion petis USC de la respektivaj Universitatoj kadre de la programoj por interŝanĝado de profesoroj kaj de instrupertoj, kaj tial tre probblas, ke tia helpo venos.

(j) Restas traktenda, do, nur la esenca problemo pri financado de la veno de studentoj. Pri tiu ĉi afero specife temas en la sekvanta punkto.

(15) Tiel en la antaŭaj (K+E)-cirkuleroj, kiel en la diversaj Esperanto-kongresoj en kiuj la projekto estis prezentita, ni petis de ĉiuj Landaj Asocioj kaj de iliaj respektivaj Junularaj Sekcioj, ke ili bonvolu studi la eblecon, financi mem por la unua(j) jaro(j) la venon de po unu aŭ du el siaj membroj junaj, tiele ebligante la faktan starton de la tuta projekto, ĝis tiu ĉi atingos la situacion cititan en (14g).

Du el tiuj Asocioj rekte promesis tian helpon, kaj pluraj aliaj kondiĉigis sian helpon al tio, ke ili vidu la aferon pli klara kaj konkreta ol en la nebulajo ŝprucanta el nura surpapera projekto.


Do, ĉar jen K+E fine ricevis la eblecon reale starti, ni ree nin turnas al ĉiuj tiuj Asocioj kaj Sekcioj, kun peto kaj antaŭdanko pri la dirita helpo, ĉar -evidente- la tuta nuno kaj sekve la tuta estonteco de K+E strikte dependas de tio, ĉu ĝi ricevos aŭ ne tian komencan helpon.

Kompreneble, estus plej utile por K+E, se helpo al venigo de studentoj venus ankaŭ el aliaj fontoj: Por ekzemplo, kaj pro tio dirita en (14g), ja estus plej bele, **se jam al tiu ĉi unua eldono de K+E povus veni studentoj el ĉiuj dek Eŭropaj Kulturĉefurboj jam nomumitaj por la jaro 2000**, ĉar tio provizus mirindan okazon efike partopreni en la naskiĝantaj kunlaborado kaj interŝanĝoj inter tiuj urboj pri kiuj oficiale jam interkonsentis la koncernaj urbestroj; krome, ĉar por tiu celo oni probable povos atingi helpon de la respektivaj urbestroj, jen oni povus garantii per tiu deko da studentoj la starton ĉi-jaran de K+E.

(D) Noto pri la urbo Santiago de Compostela kaj pri USC.

(16) (a) Santiago de Compostela estas la ĉefurbo de la hispana Aŭtonoma Komunumo (= Regiono) Galegio. Ĝi situas centre de tiu regiono en nordokcidenta Hispanio, kaj nombras 106.000 loĝantojn. Ĝia alto super la marnivelo estas 251-metra; la marbordo atingblas per veturo 50-minuta. La averaĝa temperaturo en monato julio estas 20°C; kvankam Galegio estas unu el la plej pluvozaĵ (kaj tial verda) regionoj hispanaj, ne probblas, ke pluvo aperos en la (K+E)-tagoj.

La nomo "Santiago" (pr. Santjago) etimologias en la mezepoka "Sant Yago" (= la apostolo Sankta Jakobo Zebedea); la etimologion de "Compostela" (pr. Kompostela) oni kutime venigis de la latina esprimo por "Stelkampo", sed tion oni ne plu akceptas. La "Jakoba Vojo" konsistigis en mezepoko la plej gravan ligilon religian, kulturalan kaj ekonomian inter norda Hispanio kaj la cetero de Eŭropo, ĉefe pro la tre intensa



pilgrimado al la (kredata) tombo de tiu apostolo en la Santiaga Katedralo; krome, "Jakoba Vojo" estis ankaŭ alia nomo por la Lakta Vojo, ĉar tiu ĉi montradis la direkton al la tombo. En la nunaj jaroj okazas tre intensaj revivigo kaj modernigo de tiu vojo, ne nur por religiaj, sed ankaŭ por tre diversaj celoj kulturaj, ekonomiaj, turismaj, politikaj, ks.

La urbo havas la titolon "Heredaĵo de la Homaro", atribuitan de UNESKO. Kiel jam dirite, ĝi fariĝis unu el la dek eŭropaj kulturĉefurboj por la jaro 2000. Ĝi estas fama kaj tial turisme tre vizitata pro sia historio kaj pro siaj arĥitekturaj belaĵoj, tiel tiuj imponaj kaj tradiciaj ekde mezepoko tute konstruitaj el granitblokoj, kiel tiuj ŝprucantaj de ĝiaj impetaj kresko kaj modernigo nuntempaj.

(b) En la pasinta jaro 1996 la Universitato de Santiago de Compostela festis la 500-jaran datrevenon de sia fondado. Ĝi nombras 32.000 studentojn (ja ne ĉiuj originaj de Santiago mem, sed ankaŭ de multaj aliaj galegaj urboj kaj lokoj). USC ofertas pli ol 70 malsamajn licenci-titolojn kaj pli ol 50 doktoreco-programojn. Ĝi okazigas ankaŭ internaciajn somerkursojn por instruado de la du lingvoj oficialaj kaj egale bone konataj kaj uzataj en la Aŭtonoma Komunumo, nome la galega kaj la kastilia [= hispana (antonomazie)]. Ĝi disponas abundajn kaj altkvalitajn helpajn servojn (bibliotekoj, studentaj hejmoj kaj restoracioj, sportejoj, ktp).

En la lastaj jaroj estis fonditaj du pliaj universitatoj en la du plej grandaj urboj galegaj, Vigo kaj A Coruña (pr. akorunja), (respektive kun 278.000 kaj 253.000 loĝantoj). Ĉiuj tri universitatoj havas filiojn en aliaj pluraj urboj galegaj.

(c) La internaciaj somerkursoj de USC pri la galega kaj la hispana lingvoj daŭras po unu monaton. Ĉi jare okazos unu kurso pri la galega en monato julio, kaj tri kursojn pri la hispana, sinsekve en monatoj julio, aŭgusto kaj septembro.

K+E volonte sendos senpagan informilon kaj aliĝilon por tiuj kursoj al la eventualaj petantoj.

(E) Dankesprimo.

(17) USC kaj HEF havas la honoron esprimi sian inviton kaj antaŭdankon al ĉies laŭeble plej riĉa helpo al la sukceso de tiu ĉi unua, esperiga eldono de K+E.

En la nomo de tiuj institucioj kaj en la propra, vin respekte salutas,

Lic. Antonio Alonso Núñez

Kunordiganto de K+E.

Institucioj ĝis nun jam partoprenintaj en K+E:



Universitato de Santiago de Compostela



Urbestraro de Santiago de Compostela



Hispana Esperanto-Federacio



Fondaĵo "Federico García Lorca"

NOVAĴO


Hispanlingva libreto "Pro Esperanto" [= (Plede) por Esperanto], redaktita de la kunordiganto de K+E, kaj ĵus eldonita de Hispana Esperanto-Federacio. 80 paĝoj laŭ granda A5, 132 ilustraĵoj. Prezo, 200 pesetoj.

Densa informo pri:

- La problemo de la internacia lingva komunikado.
- La starpunkto de la uzantoj kaj pledantoj de Esperanto rilate tiun problemon.
- Opinioj kaj argumentoj por kaj kontraŭ Esperanto.
- La funkciado kaj vivo de Esperanto.

Traduko aŭ adapto tuta aŭ parta estas permesataj, ja prefere per interkonsento kun HEF. Ĉiukaze, cito pri la fonto kaj alsendo de unu ekzemplero estos dankata.

HEF volonte disponigos al eventualaj tradukontoj la komputil-disketojn kun la ilustraĵoj (el kiuj 100 estas rekte uzeblaj, kaj la ceteraj pli-malpli facile adapteblaj el la hispana lingvo).



UNIVERSITATO DE SANTIAGO DE COMPOSTELA (USC)
kaj **HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO (HEF)** (Asocio de Publika Utilo, 1993)

UNIVERSIDAD DE SANTIAGO DE COMPOSTELA (USC)
y **FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO (HEF)** (Asociación de Utilidad Pública, 1993)

INTERNACIAJ PREUNIVERSITATAJ SOMERKURSOJ
PER ESPERANTO (K+E)
CURSOS DE VERANO PREUNIVERSITARIOS INTERNACIONALES
EN ESPERANTO (K+E)



Poŝta adreso / Dirección postal: Cursos Internacionales en Esperanto.- Facultad de Ciencias Políticas.- ES-15706 Santiago de Compostela (España / Hispanio).

Telefono kaj telefakso / Teléfono y telefax: +(9)81'59'80'05

Retpoŝto / Correo electrónico: iiespnto@usc.es

Bankkonto / Cuenta bancaria: Caixa Galicia, Santiago de Compostela, c/c 2091 0388 9831 1000 0977

Informilo / Boletín informativo n-ro 3.- 06.05.97.

Eldonita en Esperanto kaj en la hispana lingvo, en apartaj eldonoj / Editado en Esperanto y en español, en ediciones separadas.

Destinatarios.- Esta circular se distribuye a:

- Las 91 Asociaciones Nacionales de Esperanto registradas en el Anuario 1996 de la Asociación Universal de Esperanto, con el ruego y agradecimiento anticipado, de que tengan a bien estudiarla y transmitirla a sus miembros a través de sus órganos, también que transmitan enseguida la circular a las secciones respectivas de la Organización Mundial de la Juventud Esperantista, y que en lo posible ayuden a la realización de estos Cursos según la manera que se indicará en el punto (15).

Por causas que se verán en ese (15), nos dirigimos de manera muy especialmente a las Asociaciones Nacionales en cuyo territorio se encuentre una de las diez Capitales Europeas de la Cultura para el año 2000.

- Diversas instituciones educativas y científicas y personalidades registradas en el Anuario citado, así como también a las publicaciones periódicas generales en Esperanto y a las estaciones de radio con programas en Esperanto, con el ruego y agradecimiento anticipado a todos, de que tengan a bien difundir informes sobre K+E a sus miembros, lectores, oyentes.

- Diversas instancias educativas y políticas españolas e internacionales.

(A) INFORMACIÓN GENERAL

(1) La Universidad de Santiago de Compostela y la Federación Española de Esperanto invitan a estudiantes de todos los países a la primera edición de sus Cursos de Verano Preuniversitarios Internacionales, según el detalle siguiente:

(a) Las lecciones, de nivel preuniversitario, tendrán lugar en la USC citada, en fechas del 16 al 25 del próximo julio 1997 (ambos días inclusive), y se desarrollarán total y únicamente en Esperanto.

Si esta primera edición tiene éxito, las ediciones futuras serán más ricas en contenido y con calendario más amplio.

(b) Los temas de los Cursos serán este año los tres siguientes:

- Estudio del poeta español Federico García Lorca, y sobre el uso de la asonancia española en la poética del Esperanto.

- Introducción al derecho europeo.

- Astronomía elemental.

(Véanse en (13) detalles sobre profesores y sobre las obras que se usarán).

(c) Se fijaron esas fechas para enlazarlas con los días 8 a 13 de julio, en los que -organizados por HEF- tendrán lugar en la ciudad de Valencia (España) los tres eventos siguientes: El 7º Congreso Internacional de Esperanto, el 7º Forum Europeo de Esperanto y el 56º Congreso Español de Esperanto. (El Congreso Universal de Esperanto tendrá lugar este año en Adelaida (Australia), en los días 19 a 26 de julio).

